

## **Estrarkunsido de ILEI**

16-18 apr, 2011. Roterdamo

*Protokolis: Duncan Charters. Parto unu (16-17 aprilo).*

## **Protokolo**

Sabataj partoprenontoj: Duncan Charters (DC), Stefan MacGill (SMG), Zsófia Kóródy (ZK). Ekde dimanĉo: Julija Batrakova (JB), Radojica Petrović (RP). Ne povis ĉeesti Julián Hernández Angulo (JH). TL: Teresa Liberska: nova ILEI-volontulo. Dimanĉe, la kvinopa estraro revizitis ĉiujn nesolvitajn temojn el sabato kaj konfirmis aŭ suplementis ilin. La protokolo kunigas la rezultojn de ambaŭ traktoj.

## **Vendrede, 15an de aprilo**

Estrarkunsido de UEA, edukaj temoj diskutitaj kun partopreno de SMG.

- Financa disponigo de UEA por la eduka laboro (resuma peto sendita januare).
- Projekto 125 – konkreta rolo de UEA.
- ILEI en la UK en Kopenhago
- Flugkunlaboro por ILEI-konferenco 2012 en Ĉinio.
- Strategia Plano de UEA 2011-2020
- Modifo de la elekto-regularo de UEA, laŭ propono de pluraj, inkluzive de ILEI.

Raporto pri tiu eduka diskuto estis aparte dissenditaj. Du temoj pri la financa disponigo prokrastiĝas al dimanĉo.

Sabaton SMG ne bezonis ĉeesti la estrarkunsidon de UEA, do kunsidis SMG, ZK, DC.

## **Sabate ekde 9.30**

### **1. Malfermo kaj Bonvenigo**

1.1 Konfirmo de tagordo.

Inkluzivu planadon por la Universitata Komisiono kaj agado sub nova punkto 8.2.

Ni alĝustigas la numerojn tiel ke “konferencoj” estos sekcio "7" kaj ne "8", kaj punkto 9 iĝas 8.

1.2 Protokolado kaj raportado. Strategio por rapida pretigo.

DC jam proponis sin por protokolado laŭbezzone manke de sekretario, kaj oni tion akceptis. Plenaj notoj kompiliĝos surloke, cele al baldaŭa pretigo. Komunikado de la ĉefaj decidoj okazu plejlaste en la tago post la kunsidoj (okazis).

1.3 Rekontrolo de decidoj depost januaro 2011

La estraro trairis la liston de dudeko da voĉdonoj faritaj ene de 2011 kaj rekonfirmas kaj kelkkaze precizigas ilin. Tiu listo estu aperigita.

1.4 Strategio por kompilo de laŭmonata plano por la cetero de 2011, plus bazplanaj kompletigoj.

Ni bezonas jaran kalendar-bazon de limdatoj kaj eventoj, ĉefe labordokumenton por la estraro, tamen publikan, kiun oni povas ĝisdatigi, kompletigi, cirkuligi, kaj kiu servas kiel bazon por planoj por specifaj jaroj. Ni povos evoluigi retpaĝe grupe redaktablan kalendaron disponeblan al

estraranoj kaj sekciestroj kaj aliaj rajtigitoj. Ni anoncas novan retadreson laŭofican por la sekretario, evitante tiel la uzon de privataj adresoj: ilei.sekretario@gmail.com

## 2. Sekcioj kaj membraro.

2.1 Revivigendaj sekcioj: Britio (SMG), Irano (JH, RP, TL), Rusio, (SMG, RP, TL), pliaj...

*Britio:*

Ni ricevis demision de Angela Tellier, do ni bezonas novan sekciestran kandidaton. Necesas arigi adresojn de potencialaj membroj ĉar multaj britaj esperantistoj havas rilaton al instruado. La komitato rajtos eksigi la sekcion sen sekciestro kaj malpli ol kvin membroj, do dezirindas krei solvon antaŭ la konferenco. Ni povus labori kun ges. Fantom, John Wells, Tim Morley... EAB ne plu peras membriĝojn, nunaj membroj trovis sendependajn manierojn aliĝi.

*Irano:*

La unua paŝo estas kontakti la eksan sekciestron (SMG), kiu ne vivsignis tra pluraj jaroj. Julián konsentis okupiĝi kun helpo de Radojica. Necesas arigi potencialajn membrojn, kaj sen reago de la nuna sekciestro, serĉi novan.

*Rusio:*

Irina Gončarova ĉesis aktivi en ILEI. SMG kontaktos ŝin unu plian fojon, poste kun helpo de JH, RP, JB, ni aliru potencialajn membrojn: ekzemple en Ĉeboksari, se ne progresas nomigo de nova sekciestro kaj arigo de membroj, ni invitu al la Komitato eksigi la sekcion en Kopenhago.

2.2 Novaj sekcioj: Serbio, DR Kongo (RP?), Armenio (RP, SMG), Portugalio (SMG), Meksikio (MS, RP), Pakistano (?), Hinda Unio (?), Ĉilio (PS), Uzbekistano (?),

Serbio estas akceptita – la estraro gratulas. Rade raportis pri Kongo kaj Armenio – necesas tempo por ke petoj estu pretigitaj. Petra Smidéliusz esploras nun eblojn en Ĉilio kaj Argentino.

2.3 Rezentantoj: Restarigita: Israelo. Revivigendaj: Bosnio-Hercegovino, Estonio, Litovio, Kostariko. Dezirataj: Bolivio, Haitio, Argentino, Slovakio, Slovenio, ...

Israelo restarigita – necesis nur rememorigo. Estonio, Litovio kaj pliaj bezonas atenton. Por Bosnio-Hercegovino ni havas liston de promesplenaj homoj. Rezentanto devos remembriĝi aŭ transdoni la rolon al iu kiu pretas membriĝi. Nove nomitaj kontaktpersonoj en Bolivio kaj Haitio povus progresi al la nivelo de rezentanto. Tra la cetera Latinameriko necesas trovi membrigajn solvojn - Julián povos aktivi tie. Nun rondvojaĝas en Latinameriko Petra Smidéliusz, kun komisio raporti kiu estas aktiva aŭ aktivegebla; precipe ni celas starigon de sekcio en Argentino. Kunsido de aktivuloj kaj instruistoj ĉe la Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE - São Paulo, julio 2011), nepre organizendas. Rezentos ILEI Leysester Miró (Brazila sekciestro), Petra Smidéliusz kaj Duncan Charters. Tiuj havu la formularon por nomumi rezentantojn kaj sekciojn. Krome, oni arigu tiom da kontaktpersonoj kiom eblas, DC faru la kontaktojn kun James Rezende Piton kaj Leysester por efektivigi la planon.

2.4 Kontakt-personoj aŭ rezentantoj: Kolombio, Venezuelo, Dominika Respubliko, Nikaragvo, Salvadoro, Mongolio, Indonezio, Latvio? Strategio....

Traktita supre.

2.5 Membrokampanjo 2011 – kune kun JA. Varbilo kun IPR 2011/2, NL-DE-kongreso...

Varbilo-stokoj venis el Budapeŝto al Roterdamo por pluri al Antverpeno por dissendo kun IPR 2011/2. Stokoj estos disdonitaj en Grésillon komence de majo, kaj junio en la Nederland-Germana kongreso. Vespere de sabato la tri alvenintaj estraranoj gastis

vespermanĝe ĉe la kasisto, la post-deserto estis trakombo de la anoncita membraro por 2011 – kiu atingis 480, do estas du-trionvoja al la finsumo por 2010. Alvoko necesas (plenumita 24 apr) al la seso de sekcioj, kiuj ne deklaris membrojn. Kaj intensigo de la varbado, ĉar pli da membrigoj necesos el deklarintaj landoj.

## 2.6 Membro-administrado, reta, papera (TL, ZK, SMG, JB)

La membro-administrado estos prizorgata pere de la centro ICH (Herzberg), per transformo de la nuna mastro-listo. Realtempa dividado de datumoj kun sekcistoj estas parto de tiu transformo. Administradon laŭgrade plenumos volontulo tie. Tiu sekretariato kunlaboros kun la kasisto, kiu konservas la taskon rilati kun FEL pri la anoncado de la ‘paperaj’ membroj. La sekretariato kunlaboros por IPR 2011/2 kun la prezidanto, kiu prizorgos la retan anoncadon – tasko kiu poste transiros al la sekretariejo. La administrado de la ret-membraro pruvigas esti neniel senkosta; necesas enplekti pli forte la sekcistojn por moderigi la centran laborŝarĝon. Kaze de liver-paneoj (kiuj kelklande atingas 40%!) intervenu la sekcistoj.

## 2.7 Propono de Ĉinio: eldonu membrokartojn. Laborfortoj, buĝeto, dissendo?

La estraro elpensis solvon por plenumi tiun taskon por tiuj, kiuj deziras ĝin. SMG pretigos elektronikan version de membrokarta ŝablono (kolore kaj griz-skale), kiujn ni disponigos tra la nova retejo nur al la sekcistoj (la paĝaro permesas al ni limigi aliron al difinitaj paĝoj nur al rajtigitoj). Sekcistojn ni aktivigu. Ili entajpu la unuopajn nomojn, elprintu la kartojn kaj liveru ilin al la petintoj. Individuaj membroj rajtos peti tiun servon de la sekretaria adreso.

## 2.8 LS raportoj 2010 – Kompilo (ZB/TL). Resumi alvenintajn.

Nia volontulo Teresa Liberska kompilu en Herzberg antaŭ la konferenco raporton el tiuj kiuj venis (malpli ol dek ĝis nun ricevitaj). Ni devos interveni por akiri pli da raportoj.

## 2.9 Honoraj membroj: modifeto al regularo. Estas estraraj proponoj, aliaj ne anoncigitaj.

La estraro havas du proponojn. Unu el ili estos akceptebla nur post modifeto de la koncerna la regularo, do ni rete voĉdonigu la Komitaton antaŭ ol prezenti la kandidatojn.

## 2.10 Koleghelpa kaso: akceptitaj (25), pliaj dezirantoj (pli ol 25).

La estraro devas urĝe finfiksi tiujn 25 antaŭ la apero de IPR 2011/2. Ni havas multajn kandidatojn nun – almenaŭ kvindek. La aliĝintoj por la konferenco sufiĉe abunde donacis al Fonduso Dazzini, sed la koleghelpa kaso iom lamas. Donacintoj ĉefe pri homoj kiuj laboris por ni kaj redonacis siajn honorariojn. Ne devos realvoki al la homoj ke nun ni devas forturni membro-dezirantojn sen ebleco financi ilin. La estraro fiksu prioritatigitan listigon de la postaj 25 subtenotoj. Indus aperigi tiun listigon, kun invito, ke apogo venu por difinitaj personoj aŭ landoj.

## 3. Estraro, Komitato kaj komisionoj

### 3.1 Komitata kompletigo. Mankantaj lokoj – ch. kvin. SMG rekontrolos.

SMG devas atentigi al landoj, kiuj ne nomis komitatanojn (Norvegio, Brazilo...), reĝustigi la nombron de komitatanoj laŭ la membronomboj fine de la pasinta jaro (tasko intertempe plenumita – deko da landoj havas ŝanĝitan rajtigon – surprize multaj). Anstataŭantoj por Kopenhago estos deklareblaj elektronike por ne puni sekcistojn pri fizika vicostarado en poŝtoficejoj. Necesas krei kaj afiŝigi elektronikan respondilon por la anstataŭantoj, ĉi-foje elektronika plenskribo kaj resendo eblos (al ilei.sekretario@gmail.com kaj protekte al la prezidanto). Sed la deklaro devas esti fizike elprintita, subskribita de la sekcistoj kaj la

anstataŭanto kaj kunportita de la koncernatoj al la konferenco. Se elektronika anonciĝo ne eblas, tion oni devas fari fizike, al la stratadreso de ICH en Herzberg.

3.2 Kompilo kaj aperigo de la estrara raporto 2010. SMG. Kontribuoj alvenu ĝis 15 majo.

SMG prenas respondecon por ĉi tiu tasko. Estraranoj, gvidantoj de komisionoj sendu siajn kontribuaĵojn ĝis la 15a de majo.

3.3 Pretigo de modif-proponoj por la Statuto kaj Interna Regularo.

SMG laboras pri tio. Unua tasko estas pretigi superrigardan dokumenton por la komitato pri la ĉefaj ŝanĝpunktoj – ĉu jam akceptitaj, ĉu nove proponataj. (Tio estas verkita kaj ĉe la estraro por aprobo). Dua tasko estas prilabori la dokumentan tekston kaj proponi precizajn vortumojn por la ŝanĝoj. SMG prizorgos tion.

3.4 Komisionaj raportoj, kompletigoj, aktivigoj, kontribuoj al laborplanoj. Rolo de estraranoj.

Alvenis laborplano por la lerneja komisiono (legebla hejmpaĝe ĉe “Instancoj>Komisionoj”) ankaŭ raporto pri 2010. Ni atendas laborplanon similan de la komisiono pri Universitata agado, kaj la ceteraj.

3.5 Konfirmo pri elekto-komisiono por 2012

La Elekto-komisiono havas trijaran mandaton, sed same kiel por komitatanoj, sekciestroj, ne estis difinita la komenc- kaj fin-punktoj. La estraro proponas al la komitato, ke la elekto-komisiono estu rekonsistigita unu jaron antaŭ la elekto de nova estraro, kaj tio estu kodigita en la statut-revizio. Tiel la elektokomisiono havu plenan jaron por pretigi la sekvan estrarelekton. Tio implicas, ke la komitato en Kopenhago akceptos novan elekto-komisionon. DC kontaktos la nunajn komisionanojn por sondi pri preteco pluservi, kaj eventuale pri ideoj por rekonsistigi la komisionon.

3.6 Enpostenigo de nova sekretario. Sekretaria retejo.

Ni havas novan volontulon, Teresa Liberska, en Herzberg, preta labori por ILEI, profesie kapabla plenumi membro-administradon. Restas malferma la eblo, ke en posta dato ŝi deziru kandidatiĝi kiel sekretario, sed ni bezonas funkciantan sekretarion pli frue ol tio. La estraro konsentas ke DC petos al la elekto-komisiono serĉi novan kandidaton, laŭeble enpostenigota en Kopenhago. SMG taskas sin finredakti la du gvidilojn: unu por la sekretariaj laboroj, alia por la membro-administrado. Ni komence serĉu sekretarion kiu plenumu ĉefe la statute devigajn taskojn – rilati kun sekcioj, prizorgi la komitaton, protokoli la estrarkunsidojn, ktp. Membro-administrado ne estas devige sekretaria tasko. Trovito deĵoros unu jaron, sed povos rekandidatiĝi por plia tri-jara periodo.

FINO DE LA UNUA PARTO

DC 17 aprilo 2011 / SMG/DC 24-26 aprilo, 2011